

la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero kvin
2009-07-03
vendredo


Kio okazos semajnfine?

- ★ **Vendredon, 1:40 ptm: ekskurso al la akvario Birch**
Kie: renkontiĝu antaŭ *Asante*
(Averto: proks. 5 km da marŝado)
- ★ **Sabaton, 4:45 ptm: pikniko ĉe la International Center**
- ★ **Sabaton, 7:45 ptm: ekskurso por vidi fajraĵojn en La Jolla**

Akvario

La belega akvario *Birch* troviĝas proksimume 1,7 mejlojn (2,7 km) sude de la universitato; ni marŝos tien kaj reen aŭ ni trafos buson #30, kiu iomete mallongigas la vojon. (Tamen ĉiukaze ni devos marŝi kelkajn kilometrojn.) La enirkosto ĉe la akvario estas po **\$7.50**.

Nepre kunportu vian studentan karton, kaj ankaŭ vian fotilon, se vi havas. **Ni renkontiĝos antaŭ *Asante* je 1:40 ptm.** Estu akurate—ni ne povos atendi!



NASKano Brandon SOWERS esploras la akvarion *Birch* en 2007.



Sabaton post sunsubiro, La Jolla festos la naskiĝtagon de Usono per fajraĵoj ĉe la plaĝo. Oni povas spekti la spektaklon de kelkaj lokoj.

Ekskursoj dum la tago de usona sendependiĝo (sabato)

Tiuj, kiuj antaŭrezervis per profesoro David JORDAN, iros kune al la *International Center* je 4:45 ptm. Renkontiĝu antaŭ Asante, kaj ni promenos tien.

Post sunsubiro, oni povos spekti la fajraĵojn en La Jolla. Por tiuj, kiuj emas marŝi, ni trafos buson #30 de *North Torrey Pines Rd.* je la 7-a por renkonti profesoron JORDAN, kiu gvidos nin al laŭborda promeno. La reveno okazos en mallumo laŭ iom malfacila vojo, do kunportu poŝlampon, se vi havas.

Estas aliaj pli proksimaj lokoj por tiuj, kiuj volas spekti la fajraĵojn de UCSD. Vidu la direktojn sur la folio de profesoro JORDAN, kiun vi ricevis jaŭdon.

Ŝerco...

de Vido GILLET

Esploristo skribas sur mapo: “Indiĝenoj nomas ĉi tiun lokon ‘Via-fingro-idioto’”. (Li fingromontris kaj demandis al la indiĝenoj, “Kio estas tio?”)



La golfeto *La Jolla Cove*, ne malproksime de tie, kie okazos la fajraĵoj sabaton vespere.

Al via sano, samideano!

de Ellen EDDY

Tiuj, kiuj estis ĉi tie antaŭe rimarkas, ke en la manĝejo *Ventanas* estas nova strangaspekta ilo. Ĝi iom aspektas kvazaŭ unukrura birdo kun blua piedo kaj travidebla blua kapo. Se vi metas vian manon sub la "buŝon" vi ricevos gutojn de puriga kemiaĵo. Kelksekunde frotu la manojn, kaj viaj manoj estos purigitaj. Tio ege gravas pro la invado lastatempe de novaj malsanigaj mikroboj. Mi vidas ke studentoj faras tion post meti la restaĵon de la manĝaĵo en la ĝustan rubujon. Sed laŭ mi, estus eĉ pli efike fari tion antaŭ oni manĝas. Aparte se vi venas rekte de la klasĉambro kaj ne havas okazon lavi la manojn.



Poezia progreso

de Shai MOR

Komencanto

Pardonu al mi, mi estas en la komenc'.
"Vi ne estas" oni afable diras
al mi. Sed mi tre ofte ne certas pri
kiu lingv': V. E., L., aŭ K.?

Ĉu vere mi parolas, balbutas,
murmuras, siblas aŭ pantomimas?
ĉu vere?

ĉu ne?

antaŭen kaj reen,
antaŭen kaj reen, kaj renversen,
neniam laciĝas.
ĉiam la saman rutine, ĉiurenkontiĝe,
frustrante sed afable.

Kiel laborbesto tra kamp' de
ŝtonter' en hombien'.

kiel bebo kiu suĉas mamon,
malsata kaj seka. Mi volas tuŝi, flari,
senti kaj karesi, nek la akuzativon,
nek la gramatikon, sed la pasion.

Progresanto

Do bone, nun mi atingas je la progresnivel'!

Ĉu mi risortsaltos per elasta ŝnuro
en la Volapukan abismon de (fremd)lang'?

eĉ pli profunde, pezata

per la dikaj volumoj,

ĉu mi paraŝutus?

malrapide kaj ĝentile?

aŭ ĉu mi kapfalus profunden

al mortigantaj rokoj.

Mi estas sola, solega, timema.

Hej vi, njo aŭ ĉjo

etendu al mi la manon!

kuraĝigu min! ĝojigu min!

gvidu min tra mallum':

Tiam mi fosas en mi la kuraĝon, la certecon.

La verda tablego


de Ellen EDDY

En la loko nomita *Muir College Quad* tuj suden de *MacGill Hall* (iom kaŝita en angulo) estas tablego farita el malhela granita. Sur la tabla surfaco kaj la benkoj troviĝas multaj diraĵoj; kelkaj amuzaj, kelkaj politikaj, kelkaj ege pensindaj. Tio estas bona loko por ripozi dum la paŭzo, eĉ provi traduki unu, du diraĵojn en Esperanton. Provu: *Expiring for love is beautiful but stupid, Grassroots agitation is the only hope,*

aŭ, *A lot of professionals are crackpots.*

Eĉ pli longa kaj taŭga por la nuntempo: There is a period when it is clear that you have gone wrong, but continue. Sometimes there is a luxurious amount of time before anything bad happens.

La Verda Tablo estas kreita en 1992 de Jenny HOLZER kaj estas parto de la STUART Kolekto, aro de artaĵoj diversaj kiuj troviĝas sur la tereno de la universitato. Eble vi povas trovi aliajn kaj verki pri tiuj.



La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al [<nask.esperanto@gmail.com>](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ portu ilin piede al Asante #127.